

# BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

## Enhavo:

**Asen Grigorov**: Antaŭstaranta laboro.

**Hristo Botev**: Je la disiĝo en jaro 1868;

Al la frato, tradukoj de Ivan Dobrev.

Tio vin atendas, tr. K. Mateev.

\* \* \* : Hristo Botev.

**G. S.**: Niaj kongresoj.

**Mihail Aĝarov**: Inter ni.

" " : Peto al la malnovaj pioniroj.

Bibliografio k. a.





---

I stas komencita monkolekto por la libro  
Esperanta Sintakso

(por bulgaroj)

de

ZAHARI ZAHARIEV

Ĉi tiu valora libro, kian ĉe ni oni delonge bezonas, estos eldonita de la Bulg. Esp. Societo kaj ampleksos 5 presfoliojn, eta skribo (keglo), poŝformato kaj presita sur bela (senlignaĵa) papero.

Prezo por unuopa ekzemplero 20 lv.

La antaŭpagintoj ĝis la 15. de Junio j. k. ricevos la sintakson kontraŭ 15. lv.

Estas invitataj la grupoj kaj la izolaj samideanoj rapidi kun la kolektado kaj la alsendo de la monsumoj. Ĉion oni sendu al Bulg. Esp. Societo, str. „Car Boris“ 69 — Sofia.

De la Societo

---

## Komitato de la 13. Bulgara Esperanto-kongreso en Varna

Dato.

La 13. ordinara Esperanto-kongreso en Bulgario okazos en Varna je 15, 16 kaj 17 de Aŭgusto j. k. La renkonto de la kongresanoj oficiale flanke de la loka kongresa komitato komenciĝos de la 13. de Aŭgusto, vendredon.

Kotizo.

La kongreskotizo estas 30 lv. ĝis la 15.VII kaj 40 lv. post tiu dato; ĝi estas sendata kune kun la aliĝilo.

Aliĝoj.

La aliĝoj jam estas akceptataj, ĝis la lima tempo — 5.VIII, je kiu dato la aliĝiloj devas esti jam ricevitaj de la komitato. La malfruiĝintaj ne estos validaj, kaj al la nealiĝintaj kongresanoj la Komitato ne disponigos loĝejon. Ĝis la 10. de Aŭg. ĉiu aliĝinta kongresano ricevos kongreskarton.

La Sekretariejo

---

### Diversaj

— La Bulgara Esperantista Societo eldonos okaze de la 50-jaro de la bulgara poeto kaj revoluciulo Hristo Botev plenan kolekton de liaj versaĵoj, kiuj ĝis nun aperis en esperanta traduko.



# BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO :

por Bulgario  
40 levoĵi,

por alilando

250 sv. fr.  
au egalvaloro

MONATA ORGANO  
DE LA BULGARA ESPERANTISTA  
SOCIETO

Adreso  
de la Redakcio  
kaj administracio :  
Sofia (Bulgario),  
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lerneĵ-bibliotekoj  
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

## Antaustaranta laboro

La esperanta movado, la internacia kaj la landa, ĉe ni kaj ĉie alie, havas ĝenerale du flankojn: eksteran kaj internan.

La unua el ili — la publika propagando — ĝis nun almenaŭ ĉe ni estis tre bone zorgita. Tio estas konstatebla per la faktoj mem: sukcesoj kaj akiraĵoj ĉe oficialaj institucioj, nombro de kursoj, de novfonditaj grupoj, nombro de venditaj lernolibroj kaj de aliaj esperantaĵoj ktp. Sukcesoj, pri kiuj ĉiu el ni ĝojas.

Nun — ni turnu nian rigardon al nia interno. Ni vidu, kia estas la stato de la organizaĵo, la intersamidea kaj la grupa vivo, la meza nivelo de la lingva posedo, la literatura agado (sendube la lastaj du laŭ signifo estas la plej gravaj). Ĉu la intenseco de nia interna vivo en komparo kun la eksteraj almitaĵoj estas kontentiga? Kaj ĉu la ĝusta proporcio inter ili estas konservita? — Ankoraŭ ne!

La interna vivo mem de nia movado en Bulgario havas du malsamajn branĉojn: organizo kaj kultura agado. La nesufiĉe vigla vivo en la societo aŭ pli ĝuste — en la grupoj, ŝajne estas sentita de la ĉi-lastaj. Pruvo: la lastatempe neatendite multnombraj Esperanto-konferencoj en la tuta lando. Jen estas rimedo, kiu trafe forigas la rigidecon kaj la anemian aspekton en la societa vivo.

La plej grava manko, eĉ danĝero, estas la neĝusta traktado de la esenco, de nia lingvo mem.

Ekzistas du specoj de esperantulo: esperantano kaj esperantisto. Oni ne intermiksi ilin. La unua estas simpatianto, kunheplanto, li mem ne posedas la lingvon, ofte ne havas la eblecon lerni ĝin, sed helpas la agadon de la esperantistoj laŭpove: li subtenas la lokan grupon per mono, aliĝante kiel membro, li eĉ abonas Esperanto-gazeton, nur por helpi ĝian disvastigon. Kaj... nur tio.

(\*) Revolucio Bulgara vaporo de la montaro. (Rim. ti.)



La unua nepra kondiĉo por ke oni estu esperantisto, estas la scipovo de la lingvo. La vastigon de la lingvo ĉelas niu movado. Ĉio alia venas per si mem. Ja homo, kiu parolas, kia praktikas la lingvon, estas vivanta propagandilo, vivanta broŝuro, vivanta reklamo. Neniu pli efika, nenio pli impona ol tiu reklamo. Vortoj sen vivantaj ekzemploj, paroloj ne akompanataj de faktoj, de realaĵo — ne konvinkas.

Ĉe ni en Bulgario bedaŭrinde dum la lasta tempo abundegas la esperantanoj, kaj ne la esperantistoj. Mi legas la vortojn de bona samideano, kiu skribas pri unu el niaj konferencoj:

„... Malagrabla surprizo estis, ke la lingvo ne estas bone scipovata. Korektan parolon mi aŭdis nur de du personoj... Hodiaŭ la alfluo de nefininstruitaj esperantistoj estiĝis tiel granda, ke en unu konferenco ni ne povas aŭdi korektan esperantan parolon. Por forigi tiun mankon, oni devas fari maksimumon da laboro...“

Samideanoj, ni faru tiun laboron!

Nun, kiam venas la somero, la morta sezono por propagando kaj por kursoj, kaj kiam la plimulto el ni ĝuos iom da ripozo dum la somera ferio, ni turnu nian atenton al ni mem. Ni freŝigu kaj riĉigu niajn lingvo-konojn, ni havigu al ni esperantan legaĵon — librojn kaj gazetojn — ni streĉu niajn fortojn dum la libertempo somera por forĝi el ni esperantistojn!

A. Grigorov

### JE LA DISIGO EN JARO 1868

Ne ploru, panjo, ne plendu,  
ke mi fariĝis hajduto<sup>\*)</sup>,

hajduto, panjo, bandano  
kaj lasis vin malfeliĉan  
pri id unua veadi!

Malbenu, panjo, malbenu

turkan reĝimon tiranan,

kiu nin junajn forpelis

en tiun nigran fremdlandon

vaĝadi kaj suferadivivon

senhejmaj, nudaj, senpanaj!

Mi scias, panjo, vi ploras,

ĉar eble juna mi falos,

ah morgaŭ kiam trapasos

kvietan blankan Danubon!

Sed diru, kion do fari

\*) Revoluciulo bulgara vaganta tra l'montaro. (Rim. tr.)



kiam vi, panjo, min naskis  
kun koro vira, bravula,  
kaj, panjo, kor' ne toleras  
rigardi turkon rabli  
super gepatra kameno:  
enhejme kie mi kreskis,  
unu an lakton eksuĉis  
kaj kie belamatino  
nigrajn okulojn levadis,  
kies kvieta rideto  
malĝojan koron pikadis  
kaj kie patroj kaj fratoj  
jam senesperaj suferas! . . .  
Ah vi, patrino bravua,  
pardonu jam kaj — adiaŭ!  
Pafilon metis mi ŝultre  
kaj kuras al vok' popola  
kontraŭ tirano malpia.  
Por ĉio kara, amata,  
por vi, por patro, por fratoj  
mi kontraŭ turko ekluktos  
kaj . . . kion montros la sabro  
kaj sorto, panjo, bravula!  
Kaj kiam aŭdos vi, panjo,  
kantantan kuglon ekstere  
kaj jam junuloj elsaltas,  
eliru, panjo, — demandu,  
kie malfruas fil' via?  
Se oni dirus ke mi jam  
falas per kuglo trafita,  
eĉ tiam, panjo, ne ploru,  
nek mondon sklavan aŭskultu,  
kiam parolos, insultos:  
„Kanaĵlo li ja fariĝis!“  
Sed hejmen iru tuj, panjo,  
elkore ĉion rakontu  
al miaj fratoj junagaj,  
ke ili sciu, memoru,  
ke fraton iam ja havis,  
sed frato falis, pereis,  
ĉar plu ne povis toleri  
antaŭ turk' kapon mallevi,  
mizeron fratan rigardi!  
Diru, ke ili memoru,  
memoru min kaj serĉadu:  
la blankan karnon sur rokoj  
sur rokoj, aglaj nest-lokoj,  
la nigran sangon — en tero,  
en tero, panjo, la nigra!



Ke ili trovu la sabron,  
 la sabron kaj la pafilon  
 kaj kiam vidos tiranon  
 per kuglo lin forsalutu,  
 per sabro lin ekkaresu.  
 Se vi ho, panjo, ne povos  
 pro sentem' fari eĉ tion,  
 eliru kiam kunvenos  
 knabinoj, panjo, rondludi  
 kaj venos miaj kunuloj,  
 kaj amatino malĝoja,  
 eliru, panjo, aŭskultu  
 kun miaj fratoj junaĝaj  
 mir - kanton mian bravulan,  
 kial kaj kiel mi falis,  
 parolon kian eldiris  
 antaŭ mort' al la anaro...  
 Vi larme, panjo, rigardos  
 al tiu gaja ronddanco,  
 kaj, kiam trafos l'okulojn  
 de mia kor - amatino:  
 profunde ja eksopiros  
 du koroj por mi karegaj —  
 kor' ŝia, panjo, kaj via!  
 Kaj du ja larmoj surfalos  
 maljunan bruston kaj junan...  
 Sed tion fratoj ekvidos  
 kaj kiam, panjo, viriĝos,  
 samkiel frato fariĝos —  
 forte malamos kaj amos...  
 Se mi, patrino malĝoja,  
 viva kaj sana revenos  
 kun la standardo en mano,  
 bravuloj sub la standardo,  
 sveltaj en vesto soldata  
 kun orleonoj \*) surfrunte  
 kaj kun pafiloj surŝultre,  
 ĉelumbe sabroj - serpentoj, —  
 ho tiam, panjo bravula,  
 ho, kara koramatino!  
 Ekŝiru florojn ĝardenajn,  
 hederon kaj geranion,  
 ekplektu kronojn, bukedojn,  
 ornamu kapojn, pafilojn!  
 Tiam kun rosa floraro  
 vi, panjo, al mi tuj venu,  
 alvenu, min ĉirkaŭprenu,  
 sur bela frunto min kisu,

\*) Orbrilanta insigno portata surĉapele de l'unuaj ribelantoj — signo de l'potenco. (Rim. trad.)\*



bela, kun skrib' testamenta :

„Liberon aŭ morton bravan!“

Mi amatiĝon ekpremos  
per sanga brako al brusto —

ke aŭdu koron ludantan

ploranta mia knabino :

mi kise ploron ĉesigos,

mi buŝe larmojn eltrinkos . . .

Kaj tiam . . . panjo, adiaŭ!

Vi, amo, min ne forgesu!

Anar' ekiras, foriras,

teruras vojo, sed gloras :

mi eble juna pereos . . .

Sed rekompenco sufiĉas,

ke diru iam popolo :

malriĉa — mortis por vero,

por vero kaj por libero!

### AL LA FRATO

Ŝarĝe vivas oni, frato,

meze de la ar' stultula ;

la anim en fajro brulas,

koro sangas mortvundata.

Mi patrujon amas sankte,

testamenton ĝian gardas,

sed mi, frato, min malhardas

ĉi - stultulojn malamante.

Revoj nigraj, pensoj grandaj,

ve, krucumis junanimon . . .

kiu mane tuŝos min ja

je la koro suferanta ?

Ho, neniŭ ! Kor' ekkonis

nek liberon, nek la ĝojon —

kiel vibras ĉiun fojon

al popola plor' resone!

Ofte, frato, kaŝe ja mi

super tomb' popola ploras,

sed nu, diru kion ami

en ĉi tiu mond' senkora!

Ve, nenion ! Mankas tute

al vok' nobla eĥo sola,

kaj animo via mutas

al vok' dia — plor' popola!

Trad. Ivan Dobrev



Hristo Botev

## Tio vin atendas!

(Se ne estas vero, ankaŭ ne estas mensogo).

Monon, monon, monon! estis dirinta iam Napoleono I kaj; estis malfermita buŝon por engluti la tutan mondon; monon, monon, monon! — diras niaj bukureŝtaj popolaj bazirgenoj <sup>1)</sup> kaj streĉas la orelojn por aŭdi, kie kaj kiu mortos, por enbuŝigi lian havaĵeton; monon, monon, monon! — diradis nia kir <sup>2)</sup> Miĥalaki kiu estis ĉorbaĝio <sup>3)</sup>. La mono estas saĝo, la mono estas sentoj, la mono estas vivo, la mono estas dio. Por mono Genoviĉ estas iĝinta spiono, Najdenov — lakeo kaj Miĥajlovskii — malnoblulo <sup>4)</sup> — nur niaj bukureŝtaj patriotoj ne laboras por mono en la kafejo, sed por ke digestiĝu la manĝaĵo en ilia stomako. Sed el ĉiuj ĉi oraj bovidoj, inda por nia profunda estimo kaj por nia alta atento estas kir Miĥalaki. Kaj lia sortfeino estas komuna por ĉiuj „grandaj“ homoj, lia sorto estas pli tragedia ol la Don Kihota.

Ni staras en la antaŭvespero de Ĉieliro kun avo Obreŝko Kartunkoviĉ sur la strato kaj rigardas, kiel la infanoj ludas je „forno-forno-forneto“. De malsupre venas kir Mihalaki kaj kiam li iras, la muroj ŝajne diras al li: „brave, brave! granda homo, saĝa homo“. Kaj granda kaj saĝa homo estis kir-Miĥalaki: lia ventro — ja kiel vi povus fari tian ventron — eĉ se vi kunigus la ventrojn de la ses bukureŝtaj ĉorbaĝioj, kvankam ili estas formanĝintaj pli da popola havaĵo; lia kapo — kvin tiaj, kian havas „nia doktoro“, kvankam la lasta estas profesoro „de la bukureŝta medicina fakultato“ kaj kun sia ĉevala saĝo estas miriginta eĉ la eminentularon. La kapoj kaj ankaŭ la ventro de kir Miĥalaki estis troveblaj en neniu bestbuĉejo. En lia ventro povus libere sidiĝi kvin turkoj kaj trinki kafon; en lia kapo vi povus kovsidigi anserinon kun tridek ovoj, kaj lia brusto — ja bruston ne havas niaj ĉorbaĝioj. La vizaĝo de kir Miĥalaki similas je panbaka kloŝo, la nazo — je ŝimiĝinta beraro, la manoj — liajn manojn oni ne povas vidi rigardante de antaŭe; kaj la piedoj — nur el liaj piedoj oni povas fari 5—6 pastrojn. La malantaŭaĵo de kir Miĥalaki estis iom pli delikata: lia kolo — kiel la talio de porko, lia dorso — ronda monaĥeja manĝotablo.

— Forkuru be-e-ej! forkuru! la ĉorbaĝio venas! — ekkriis unu el la buboj, ekvidinte kir Miĥalaki'on — turnis la kalkanojn kaj forkuris kvazaŭ brogite. La infanoj — unuj forkuris, aliaj kvazaŭ konsternitaj algluis sin al la muroj; fingreekgratisiajn nazojn kaj time atendis la trapason de la vilaĝa bovoviro.

<sup>1)</sup> Ofenda nomo de la komercistoj Rim. tr.

<sup>2)</sup> Kir — greka vorto, signifas sinjoro. Rim. tr.

<sup>3)</sup> Ĉorbaĝioj — riĉa klaso de la bulgaroj dum la turka jugo; la ĉorbaĝioj ordinare estis proksimaj al la regantaj turkoj, influhavaj ĉe la administraj organoj. Rim. tr.

<sup>4)</sup> Botev aludas pri siaj samtempuloj, pikante ilin satire. Rim. tr.



Kaj kir Miĥalaki kun plenblovita ventro simile je velo, naĝas kaj naĝas! „Ih! se iu elpikus per bruliĝo vian unu okulon vi eksimilus je ciklopo“, — mi diris en mi; ĉar ĝuste tiam mi studadis la grekan mitologion. Sed antaŭ ol iu manetendus por trapiki la okulon de kir Miĥalaki — kir Miĥalaki mem manetendis kaj kaptis unu bubon je la orelo. — „Azenoj tiaj... ĉu por vi preĝejo ne ekzistas, ha? Nu, iru por preĝi dion por viaj gepatroj“. — „Ole-le! onklo Miĥalaki, vi forŝiris mian oreleton!“ ekkriis la bubo kaj kurbiĝis tiel, kiel li ne estis kurbiĝinta eĉ en la manoj de sia instruisto. Kir Miĥalaki lasis la bubon kaj forkurigis ĉiujn nudkapulojn, por ke ili iru preĝi dion.

„Tiel ja Napoleono estas tirinta la orelojn de l' popoloj ĝis kiam, fine, ankaŭ oni lin kaptis je la orelo kaj kondukis por preĝi dion sur la insulo Sankta Heleno“ — mi ekpensis tiam. Sed ankaŭ nun ja estas tiel: la mondo, ŝajne, estas farita, por ke oni unu la alian tiru je la oreloj. Kaj ekrigardante la orelojn de la bulgaroj, al mi ŝajnas, ke ili estas tre grandaj: preskaŭ-preskaŭ azenaj.

— He, Koljo, kial vi forkuris, kiam vi vidis la ĉorbaĝion? — demandis avo Obreŝko la bubon, kiu estis jam reveninta kaj saltetis antaŭ ni kun peco da sekala pano en sia mano, de kiu demordante, li viŝadis samtempe sian nazmukon.

— Mi foriris ĉar li tiras orelojn.

— Ja kial li tiras ilin?

— Ĉar li estas ĉorbaĝio.

— Kaj kial li estas ĉorbaĝio?

— Nu—ja—nu? Ĉar li havas monon.

— Sed, se li ne havas monon, ĉu vi ne estus forkurinta?

— E-he! Ke mi forkuru? Ja, mi prenis tiam la bastonon de mia patro, por lin irigi al la marĉo kaj trinkigi, diris la bubo, sed, ĉirkaŭrigardinte, tuj ekkaptis la randon de sia pantaloneto kaj oni nek vidis, nek aŭdis plu lin. Mi ekrigardis: la ventro sin turnis de la alia flanko, kaj la ventro trenis kir Miĥalaki'on en la malan direkton. Kir Miĥalaki marŝas, kaj kun li ankaŭ marŝas la edzino de Mito Ĉengeljat kun suĉinfano en siaj manoj kaj kun ankoraŭ kvar aliaj infanetoj post si, ormanitaj per la tuta lukso de l' malriĉeco kaj unu ol alia pli malindaj. Ĉengelka (Ĉengel-edzino) ploras kaj kir Miĥalaki ekridetas sub lipharoj.

Mi petas vin, kir Miĥalaki, havu kompaton je dia nomo — liberigu Miton el la malliberejo. Pro 30 groŝoj tutan monaton jam li estas tie kaj mi—sola virino — kion mi faru? Tiom da infanoj, kaj eĉ peco da pano ne estas hejme... de post hieraŭ ili ne estas manĝintaj...

— Sed ja mi cin ne instigis naski tiom da infanoj. Malriĉuloj vi estas, vi devis — fari ekonomion (ŝparon).

— O-oh, ne diru, kir Miĥalaki, kian kumanion\*) (ŝpa-

\*) Vortludo: la neklera virino miksis la etimologion de l' vorto *ekonomio* (parolata de ŝi erare *kumanio*) kun la bulg. vorto *kum* — baptopatro. R. tr.



ron) fari, ja la kumo (baptopatro) estas pli malriĉa ol ni! Por vestoj, por kandelo, por ĉi tio, por tio, ĉiam ni elspezadis. Nur la pastro — al la diabloj lia pastreco — nur li prenis de ni 9 groŝojn pro bapto. Kaj kun 30 groŝoj kion pli frue? Ni delonge estus pagintaj al vi tiun ĉi monon, sed jen: la azenon surprimis la argilo, la porkon oni mortigis en via ĝardeno, kaj la kokinoj, se vi ne kredas, venu vidi — ĝis la lasta mortis pro la pipso... Ne estas, ne estas de kie preni: unu ĉeno kaj unu litkovrilaĉo estis restintaj, kaj ilin mi alportis en vian domon... Mi ne scias jam kion fari!

— Tio ne estas mia afero. Milfoje mi diris al ci: alportu al mi 30 groŝojn kaj prenu la litkovrilaĉon, kaj la ĉenon, kaj la edzon... Se ne — nu, defol burdan \*): — Se ci amas cian edzon, iru kaj loĝu kun li en la azena paradizo. — Mi diras al ŝi fari ŝparadon — ŝi babilas al mi, ke la baptopatro, la pastro kaj la azeno estas kulpaj: Ĉarlatahino tia: monon se ci ne havas, ĉu ci ne havas almenaŭ cerbon en cia kapo? Komprenu kion mi diras al vi.

— O-oh, oh! Kompatu min, kir Miĥalaki, kian monon kaj kian cerbon vi volas de virino? Kiu havas en la monujo, tiu havas ankaŭ en la kapo, sed mi? Ho-ve, ho-ve al mi kun tiom da infanoj!...

— Ha! pro tiu ĉi babilado — „dio absolvu!“ Pro tio ja mi diras al ci, ke mi bezonas monon-monon-mono-o-on? Alportu 30 groŝetojn — kaj mi liberigos vian edzeton — ĉu ci komprenis?

— Mi komprenis... apenaŭ diris Ĉengelka kaj per la rando de sia tuko komencis viŝi siajn larmojn. Kaj kir Miĥalaki eltiris sian tukon el sia ĉebrusto kaj viŝis la ŝviton de sia belega vizaĝo. „Senfortigis min tiu ĉi malbenita virino“ — ekĝemis li, kaj ekiris post sia ventregoj.

— Ke mono bruligu vian hepaton! Ke la ĉenon, kiun vi prenis de mi, rusto formanĝu sur via kolo! Kaj kun mia kovrilaĉo vian mortintportilon oni kovru! — ekkantis aŭ tutegale, ekploris Ĉengelka post kir Miĥalaki kaj eniris en sian hejmon por kolekti herbaĉojn kaj nutri siajn infanojn.

— Nu, avino, kial vi ne estingas tiun ĉi malbenitan sankt-lampeton, ĝi ja lumas al la katino, ŝi gratas sur la mato, kaj al mi malhelpas ekdormi?

— Peko estas, filo, kiel mi ĝin estingus, ja dum tiu ĉi nokto ĉieleniros la Sinjoro?

— Mi ja pensis, ke ci ĉieleniros; — mi vidas, ke ci jam eksimilas je koboldo.

— Eh, se mi havus tian feliĉon! Kiu estas senpeka kaj pia, nur tiu ĉieleniras; kaj mi — kiajn bonfarojn mi faris?

— Estingu la kandelon — jen estas unu bona faro. Nokto-mezo jam estas, la Sinjoro verŝajne estas ĉielenirinta.

— Kaj ja, ĉu mi scias? Se li estas ĉielenirinta, tiam mi ĝin estingu, kaj morgaŭ denove kaj pli frue mi ĝin ekbruligos, ja!

\*) Turke: for de tie ĉi.



Mia avino stariĝis por estingi la kandelon, sed ĝuste kiam ŝi etendis la manon tuj ekpafis 5—6 pafiloj ie proksime en la kvartalo kaj ŝi restis kvazaŭ ŝtonigita. La pafiloj ree ekpafis kaj krio „jurja! jurja!“ traflugis la tutan kvartalon. Mia avino komencis signi krucojn kaj fari riverencojn.

— Avin-o-o-o, la Sinjoro ĉieleniras, — ĉu vi aŭdas?

— Silentu ci! Kia Sinjoro? tiuj estas banditoj.

Kaj la pafiloj pafadas kaj krioj fendas eĉ la ĉielon.

— Pardonu mi-i-n! pardonu, bonaj homoj! pereas mi jam!

— ekmuĝegis la gorgo de kir Miĥalaki. — Ĉu vi aŭdas, avino?

Kir Miĥalaki ĉieleniras, ĉu vi aŭdas? La anĝeloj lin trenas sur la monton. — „Silentu, ci aĉulo, pri kiaj anĝeloj vi pensas? Tio ĉi estas rabistoj. Pereis la bona hometo“.

— „Mi petas vin fratoj! Mi petas vin, kiel Dion, ne pereigu min! Kvin infanetojn mi havas...“ — krias kir Miĥalaki, sed tiel, kvazaŭ li dronas. — Mi ne igis vin, naski tiom da infanoj“ — respondas sankta ĉefanĝelo, kaj la ponardoj senŝpareme klakadas sur la dorson de kir Miĥalaki. — „Ĉieleniro! — Avino-o-o-o! Ĉieleniris jam li — nu estingu la sanktan lampeton“. Kaj vere, mia avino ne estis tiel stulta: ŝi komprenis, ke ne la Sinjoro ĉieleniras sed kir Miĥalaki, kaj pro timo, ke la anĝeloj eble vidus ŝin kaj venus por ĉielenirigi ankaŭ ŝin, ŝi estingis la sanktan lampeton kaj eniĝis sub la kovrilon por preĝi tie al dio. Kaj, gloron al dio, la katino ĉesis grati sur la mato kaj mi ekdormis.

La sekvantan tagon, je Ĉieliro Krista, la tuta urbo festis la ĉieliro de kir Miĥalaki. Unuj parolis, ke ili vidis, kiel la anĝeloj ĵetis sur lian kolon ĉenon kaj metis sur lian kapon kronon — varmegigitan subkaserolan tripiedaĵon; aliaj konigadis, ke kir Miĥalaki jam estas sanktiĝinta kaj en la paradizo kun la filoj de dio li manĝas panbrogiaĵon; kaj triaj predikis, ke la anĝeloj suprenportis ankaŭ tri sakojn da mono; kaj tio ĉi ne ŝajnas esti mensogo, ĉar ja Dio, estante ĉorbaĝio, sen mono apenaŭ havus saĝon. Sed mi scias nur tion, ke je ĉieliro Ĉengelka ekbruligis antaŭ la figuro de sankta Mina vakskandelon por 10 paraoj, sed ĉi tion ŝi faris pro tio ke ŝia edzo ne estis jam en la malliberejo. Kir Miĥalaki per mono sin deaĉetis ankaŭ de dio. Post unu tuta monata malliberiĝo, ne en la azena, sed en la dia paradizo, kir Miĥalaki revenis, sed nur sen mono, sen saĝo kaj kun nomo ŝanĝita de ĉorbaĝi kir Miĥalaki je Mihal.

Kaj ekiris Mihal por rakontadi al sia subularo pri sia ĉorbaĝieco kaj pri sia ĉieliro, kaj la infanoj jam ne forkuras de li, sed alsaltas unu el ili antaŭ li kaj lin piketas sur la ventron kaj diras: kion havas tie ĉi Mihal? — Mihal respondas... kaj kiam ĝin vi estas enmanĝinta? Kiam vi estis ĉorbaĝio, ĉu ne? Kaj alia infano malantaŭe salivumas sian fingreton kaj rapidkurante puŝas la ĉorbaĝion. Avo Obreŝko ridas, ridadas kaj diras: ne sufiĉas al la azeno la skabio sed ankaŭ la muŝoj ĝin mordas.



## Hristo Botev \*)

(1847—1876)

La bulgara nacio festas gloran datrevenon. Kvindek jaroj pasis post la morto de unu el la plej grandaj bulgaraj poetoj, tre trafe nomata: la bulgara Petöfi.

Ĉe ni, en Bulgario, Botev estas la simbolo de la justeco, de la nobla forteco, li estas ekzemplo por tiuj, kiuj decidis servi al la ceteraj homoj.

La plej eminenta reprezentanto de la poezio de la liberiga epoko ĉe ni estas Hristo Botev. Ĝis hodiaŭ ankoraŭ li ĉiam vekas kaj estonte vekados entuziasmon, admiron kaj intereson. Ĉar ĉe Botev la vivo kaj la poezio kuniĝas tiel, kiel kuniĝas vortoj kaj faroj.



Botev naskiĝis en la urbeto, Kalofer dum 1847. Filo de la montaro, estinta jam de pratempe protektanto de la liberamaj ribeluloj, kies kantojn kaj legendojn li aŭskultis junaĝe; ido de instruista familio, de klera kaj inteligenta patro, kiu heredigis al sia filo vigran societeman senton, nerompeblecon de la karaktero kaj literaturan talenton, Botev laŭnature estis ribelanto, kun nevenkebla sopiro al libereco. Liaj infan- kaj junul-jaroj estis plenigitaj per eksterordinara petolemo kaj aventuroj, kiuj ne unu fojon malgajigis la maljunan instruiston.

Dezirante instrui al sia kapabla filo pli altan sciencon, la patro lin sendis al Rusio. En 1863. la junulo Botev troviĝis en Odesa, kie li studis en la gimnazio. En ĝi li restis dum du jaroj.

Tiutempe la rusa progresema inteligentularo kaj la energi-plena junularo travivis apartan spiritepokon. La tirana reĝimo, la servuteco de la vilaĝanoj, la premo super la spiritoj movis la plej bonajn filojn de Rusio, ĉe kies frunto staris la ultraliberalaj kaj reformemaj verkistoj—publicistoj: Ĉerniŝevski, Dobroljubov, Pisarev, Herzen, Bakunin. La socialaj ideoj de la francaj utopiistoj tiutempaj, la materialismaj konceptoj de la okcidentaj pensuloj, la pozitivaj sciencoj, precipe la naturscienco, penetris Rusion, kaptis la junularon kaj la inteligentularon, kiuj, grupigitaj en ron-

\*) Laŭ la libro „Hristo Botev“ de Cvetan Minkov.



detoj, solvis en longaj kaj pasiplenaj disputoj la gravajn kaj seriozajn problemojn pri la sociala rearanĝo kaj feliĉo de Rusio kaj de la homaro.

Botev estis forlogita en tiu movado, ekvizitis tiujn „rondetojn“, kiuj donis al lia malkvieta kaj frue vekiginta naturo multe pli da nutraĵo, kaj li rompis sian studon en la gimnazio.

Restinte sen rimedoj, entuziasmiginte pro altaj socialaj idealoj kaj plenigite de neordinara patriotismo, Botev likvidis kun sia lerneja studado, ne ĉesigante ta nen sian memklerigon, dank al kiu li akiris vastan kaj multflankan spiritan kulturon.

Li forlasis Odesa-n kaj oficiĝis kiel instruisto en la Besarabia vilaĝo Znamenka. Tie ĉi Botev por unua fojo distingigis kiel publika aganto—li parolis al la sklavigitaj rusaj vilaĝanoj pri liberiĝo kontraŭ la farmistoj. Pri tiu agado la registaro baldaŭ sciigis kaj Botev estis devigita unu nokton fugi al Bulgario.

Veninte en Kalofer, li fariĝis helpanto-instruisto ĉe sia patro. Sed ankaŭ tie ĉi lia tempesta spirito ne unu fojon kaŭzis maltrankvilajojn al la lacigita pro zorgoj kaj suferoj patro. En la festo de la sanktaj Kirilo kaj Metodjo li faris ribelan, danĝeran paroladon, pro kiu liaj proksimuloj ektimis kaj kontraŭ kiu la riĉuloj indignis. Tie ĉi Botev la unuan fojon enamiĝis. Lia senretena parolo kontraŭ fiburĝoj kaj turkoj, lia stranga konduto, la deziro instrui sian filon, igis la patron lin denove sendi al Rusio (1867).

Botev ekiris al Rusio, la promesita tero de la tiama bulgara inteligentularo, sed ne alvenis al ĝi: trapasante Rumanion, li troviĝis en la mezo de la emigrantoj—*h a ŝ o v e*, intimiĝis kun ili. La vojo de lia agado plue estis jam neeviteble destinita: ne scienculo volis fariĝi Botev, ne pacema kaj senpersona regnanto de la sultano, ne apogo kaj fieraĵo de la maljunaj kaj turmentitaj gepatroj, sed luktanto por libero.

Nun jam komenciĝis la maldolĉaj jaroj de „malfacila emigrado“, de „malĝojoj kaj suferoj“. De urbo al urbo, ĉi-tage en Braila, morgaŭ en Bukureŝto, postmorgaŭ en Aleksandrio, malriĉa, lumigata de la grandeco de sia idealo, al kiu li servas, ĝis kiam la malamika kuglo lin trapikas, li ŝanĝas siajn profesiojn. Kompostisto kaj instruisto, aktoro en la trupo de Vojnikov kaj gazetisto, studento kaj gvidanto de la emigrularo, li pasigas la junecon en suferoj kaj senĉesa legado, li konversacias kun rusaj revoluciuloj, inter kiuj ankaŭ la fama Neĉaev, verkas siajn flamantajn, senmortajn kantojn, postkiam li ilin tiom da fojoj deklamis en la sufokaj drinkejoj antaŭ la ribeluloj, kaj atendas malpacience la tagon, kiam li ekiros kun „anaro fidela, konkorda“, animiĝinte de unu testamento: „Libero kaj morto bravula!“

En Braila li redaktis la ĵurnalon „Дума на българските емигранти“ („Vorto de la bulgaraj emigrantoj“). Liberigite de karcerio, li venis Bukureŝton en la vintro de 1872—1873, kie li komencis aperigi la satiran gazeton „Будилникъ“ („Vekilo“), ĉesinta aperi je sia kvara numero. En Bukureŝto Botev faris intensan literaturan agadon kaj aktive partoprenis en la revolucia



movado kiel kunlaboranto de Karavelov<sup>\*</sup>). La malgajigaj sciigoj el Bulgario pri la malsukceso de la afero ŝancelis Karavelov'on kiu retiriĝis de la revolucia tendaro kaj per sia nova gazeto „Знание“ („Scio“) aliĝis al la kleriga direkto de la emigrantaro. Botev famen ne malesperiĝis, fariĝis gvidanto de la revoluciema parto de la emigrantoj en Rumanio kaj per la gazeto „Знаме“ („Standardo“) subtenis la humoron de la emigrantoj kaj de la popolo.

Inter Karavelov kaj Botev estiĝis akuta konflikto kaj ambaŭ agantoj malpaciĝis por ĉiam. La Hercegovina ribelo en 1875 vekis la esperojn de la emigrantaro, kiu decidis la kiom eble plej baldaŭan ribeligon de Bulgario, kaj la subtenon de la ribelo per kelkaj bandoj. La ribelo fiaskis. La printempon 1876, la revoluciaj esperoj de la emigrularo denove vekis—estis pretigataj kelkaj taĉmentoj. Botev organizis sian propran trupon kun kiu li en Majo supreniris la vaporŝipon „Radecki“, konkeris ĝin kaj per ĝi eniris Bulgariion. Sed, veninte en Bulgario li komprenis, ke oni lin trompis, tamen—jam estis malfrue. Je la 20. de Majo li estis mortpafita de malamika kuglo (1876).

Botev mortis tro juna. Li postlasis dudekon da versaĵoj, kelke da felietonoj, ĵurnaliste-politikaj artikoloj, politikaj komedioj kaj literaturaj recenzoj.

Liaj esceptaj spiritaj fortoj estis prave taksitaj de Karavelov, kiu diris pri li: „Juna li estas, nesperta li estas, sed tiu homo estas geniulo“.

Harmonie perfekta naturo, Hristo Botev eĉ hodiaŭ estas la plej populara persono de nia pasinteco kaj la plej amata bulgara poeto. Li prezentas harmonian kuniĝon de ideoj kaj agoj, kompletan kunfluan de poezio kaj de vivo, li estas standardo de ĉiu lukto por pli superaj formoj de la vivo kaj de la penso ĉe ni, enkarniĝo de aktiva idealismo, simbolo de malkvieta kaj nobla protesto kontraŭ la malbono en la mondo, flagranta poeto de la libero, frateco, vero kaj homeco.

Botev estas unu el la „esceptaĵoj“ en nia poezio. Li levigas alte super ĉiuj siaj kolegoj antaŭ la liberiĝo de Bulgario per la kaptorna senpereco de siaj kantoj, per ilia malofta sincereco kaj elementa inspiro. Liaj fajroplenaj poemoj, saturitaj per la ardo, la sufero kaj la indigno de la kvincentjara sklaveco de l' popolo, tuj kaptas la animon, profunde ĝin penetras, ĝin elfunde skuas kaj engravuriĝas tie por ĉiam. Ili estas la unikaj kantoj en la bulgara poezio, kiujn konas ĉiu pli malpli klera, ja eĉ neklera bulgaro. Ne ĉar ili estas malmultaj laŭnombre—la perloj de ĉiu poeto estas malmultaj laŭ la nombro—sed ĉar ili estas tiel intimaj al la bulgara animo kun sia ventega malpacemo kontraŭ la malbono, kun sia profunda homeco.

Multaj el liaj versaĵoj estas bonege tradukitaj en Esperanto de nia samideano Ivan Dobrev kaj aperos en aparta libro.

<sup>\*</sup>) Tiam gvidanto de la bulgara revolucia movado.



## Niaj kongresoj

La celo de niaj kongresoj ĉiujaraj estas: manifesti la ideon pri la l. i. Esperanto; montri al la skeptikuloj, ke per tiu lingvo oni povas esprimi ĉiujn sentojn, tuŝantajn la homan animon; ke per ĝi oni komplete interkompreniĝas, konversaciante kun alilandanoj kaj fine demonstracii la interpopolan solidarecon, fratecon kaj amon.

Ĉi-celon persekutis la serio da ĝisnunaj kongresoj dum la jaroj de propagando. Tio estis la unuaj paŝoj de niaj antaŭuloj, ankaŭ ĝis la nuna tempo mem. Hodiaŭ, mi opinias, venis alia momento en la evoluo de nia movado, momento postulanta ke oni tute alian celon antaŭmetu al niaj kongresoj, ke ili pleniĝu per tute alia enhavo. Hodiaŭ, kiam malfermiĝas ĉiuj pordoj de la tuteca vivo por Esperanto: historio, literaturo, medicino, tekniko, socialaj sciencoj ktp., al mi ŝajnas, oni faras krimon, se oni perdas tempon marŝante sur la sama vojo, sur kiu oni marŝis longajn jarojn.

Kelkaj samideanoj plendas, ke la socio skeptike konsideras nian movadon. Mi opinias, ili ne pravas en tiu ĉi konkludo, ĉar hodiaŭ neniu demandas, ĉu povas kaj devas ekzisti Esperanto kaj ĉu estas bezono je ĝi. Ne! Tio estas duboj de pasintaj jaroj, de pasintaj tempoj, kun malintense disvolvitaĵaj ekonomi-kondiĉoj, kun malriĉaj kaj limigitaj bezonoj spiritaj kaj materiaj.

La nova ekfloro de la Esperanto-movado esprimiĝis en la Ĝeneva internacia kongreso dum la jaro 1925. — Krom la aliaj problemoj de karaktero organiza, la kongresa komitato zorgis malfermi someruniversitaton ĉe la kongreso. Tasko tre nobla kaj laŭdinda. Deziro kaj iniciato imitindaj. Esperanto jam devas enkar-niĝi en ion konkretan: ĝiaj adeptoj devas ĉesigi la nurajn parolojn kaj diskutojn, ili devas ĝin plene en la efektivaĵo de la vivo apliki. Kion ni el Esperanto faras, tio mem defendiĝos kaj mem pledos por si.

Mi rememoras, en la tagordo de la lastaj kongresoj estis ankaŭ punkto „referaĵo“, kiu bedaŭride ne povis esti legita, tial ĉar pro demandoj bagatelaj estis perdataj tutaj horoj. Anstataŭ ŝanĝi ĉiujare la statuton, kie ordinare malgravajn diferencojn oni diskutas tutan duontagon, estus preferinde utiligi la malmultan kaj karan tempon de la kongresoj per io scienca, el kio oni povus havi grandan utilon — parolado, referaĵo ktp.

Nia samideano Ada presigis en „B. E.“ historian studon pri la bogomilismo. Laŭdinda iniciato! Tiu malgranda laboraĵo levos la prestiĝon de la lingvo, riĉigante nian malriĉan originalan Esperanto-literaturon. Tio donas la kredon al mi, ke la sama samideano povos ankaŭ ion alian samtiel valoran prepari por iu kongreso. Ankaŭ aliaj samideanoj, scipovantaj la lingvon, povus referi ĉu pri la interna ideo de Esperanto, aŭ pri la evoluo de la internacia Esp.-literaturo, aŭ pri la instru-metodo de la lingvo ktp.



La ĝisnuna aranĝo de niaj kongresoj devas esti ŝanĝita konforme kun la novaj sukcesoj de la lingvo kaj kun la nova epoko. Necesas, ke en la tagordon de la kongreso venonta oni almenaŭ du referaĵojn enmetu. Laŭeble ili okazu en Esperanto. Nenio pli bone efikas sur la psikstaton de la aŭskultanto ol la ekzemplo aŭ la vidita kaj aŭdita. Pli efika propagando ol ĉi tiu ne povus esti.

Mi dezirus aŭdi la opinion ankaŭ de ceteraj esperantistoj pli kompetentaj pri la ĉi-supraj ideoj.

### Inter ni

Mi volas ne ripeti la malbonan kutimon, kreitan inter la esperantistoj, ĉiam esprimi nur laŭdojn kaj prisilenti la erarojn. Per tio ili opinias, ke estas impulsataj la iniciatintoj al plua laborado. Hodiaŭ, kiam la movado jam multe kreskas, oni devas ne tiom atenti pri la kvanto de la laboro, kiom pri ties kvalito. Tio instigas min noti kelke da mankoj, kiuj montriĝis ĉe la Plovdiva Konferenco okazinta dum la ĉi-jara Pasko.

Mi havis la eblecon observi la antaŭpreparon de la konferenco. La aranĝantoj laboris kun grandaj fervoro kaj entuziasmo por ties sukcesigo, tial ili meritis laŭdon kaj dankon, kiujn ili ne aŭdis, ĉar al ili mankis la bona organizo kaj sperto en la laboro, kaj ili ne povis atingi la deziratajn rezultaĵojn. Sed tio ne devus esti kiel riproĉo — ili supozeble lernis kiel labori alian fojon.

La konferenco estis bone vizitita. Humoro kaj fervoro komence ne mankis. La entuziasmo konsiderinde kreskis post la parolado de D-ro Gavrijski. Sed venis la tempo de la laborado, oni devis komenci la diskutojn. Tiam evidentiĝis, ke malmultaj nur estis antaŭe pensintaj kio estas farota en la konferenco. Mi eksciis, ke neniu el la grupoj antaŭe ion proponis kaj ke la delegitoj ne estis preparitaj pri la problemoj solvotaj. Estis farita grava eraro, kiu ofte estas ripetata inter la esperantistoj — oni lasis la prezidon al junulo. La prezidanto opiniis, ke li devis paroli laŭeble plej multe, permesis al si post ĉiu parolinto kritiki ties dirojn kaj mem fari superfluan paroladon. La lingvon li scipovis tro malbone kaj faris netolereblajn erarojn. Al la laboro oni same mallerte alpaŝis: anstataŭ substreki la ĝeneralajn mankojn kiuj malhelpas la tutan movadon, anstataŭ utiligi la sperton kaj la konsilojn de la aliaj, pli spertaj samideanoj, oni komencis rakonti, unu post la alia, historietojn, kiam kaj kiel komenciĝis la movado en ĉiu urbeto kaj vilaĝo, oni eldiris siajn malfeliĉojn, kiuj tiel ektedis, ke oni ne plu havis paciencon finaŭskulti la reprezentanton de la Centra komitato. Pro la mallerta gvido la diskutado longiĝis kaj glitis for de la temo kaj, kiam la tempo progresis, oni voĉdonis decidojn, pri kiuj neniu eĉ vorton ĝis tiam aŭdigis.

Kun bedaŭro mi devis konstati, ke ankaŭ la presorganoj de la societo ne estas regule legataj. El tio konsekvencas, ke



mankis tuteca kono pri la movado, ties karaktero, organizo kaj mankoj. Per tio mi klarigas al mi, kial tia grava demando kiel tiu pri la Lernanta Ligo, diskutigis sen ajna interesemo kvazaŭ devigite kaj por ne ŝajni ignori al la Centra Komitato.

Malagraba surprizo estis, ke la lingvo ne estis bone sciopovata. Korektan parolon mi aŭdis nur de du personoj. La ceteraj preferis instrui la aliajn, sin mem tamen ne perfektigi. Hodiaŭ la alfluo de nefinistruitaj esperantistoj estas iĝinta tiel granda, ke en unu konferenco ni ne povas aŭdi korektan esperantan parolon. Por forigi tiun mankon oni devas fari maksimumon da laboro, ĝi konstante devus esti substrekata, ĉar ni kun niaj organizaĵoj kaj lingvokonoj tagon post tago restas ĉiam pli kaj pli malantaŭe de la sukcesoj kaj riskas grandan parton el ili perdi se ni daŭrigus tiun vojon. Kaj Dio nin helpu, se aperos bezono defendi la ideon de pli inteligenta kaj konanta la demandon samideano. Tion povus fari nur kelkaj el la partoprenintoj de la konferenco — preskaŭ ekskluzive junuloj. Tiu konferenco al ni instruas, ke oni devos jam pli serioze atenti pri la interna organizo, disvolvigi agadon inter la esperantistoj mem kaj nur poste serĉi novajn adeptojn.

Mih. Aĝarov

## Peto al la malnovaj pioniroj

Estis jam skribite\*), ke ĉe BES oni devas aranĝi bonan bibliotekon. Ĝi tamen ne devas prezenti nuran kolekton de libroj, belaspekte binditaj en unu aŭ pli da ŝrankoj. La biblioteko devas vivi, devas esti utila al la movado. Unu el ĝiaj unuaj taskoj estas enteni laŭeble ĉiujn niajn eldonaĵojn en kaj pri Esperanto. Tiam taskon bedaŭrinde ĝis nun neniu metis. Io pli — ne estas sciata precize kiaj preseldonaĵoj en kaj pri Esperanto aperis ĝis nun en Bulgario. Neniu provis verki similan bibliografion sendube necesan. Aperis ankaŭ sufiĉe da gazetoj, sed pri ilia enhavo estas tre malmulte sciata, kaj kelkajn preskaŭ neniu eĉ vidis. Tiurilate la malnovaj agantoj estas la solaj, kiuj povus doni informojn. Ili estis la unuaj eldonistoj, redaktoroj, tradukistoj de paĝoj el la literaturo bulgara. Iliaj ĉi-laboroj ne restu nekonataj en la estonteco. Ili valoras unue kiel unuaj manifestaĵoj de vivo esperantista generale, kaj due kiel fundamento, sur kiu estis masonita la tuta Esperanto-movado ĉe ni. Ĉio, kio estis ĝis nun eldonita devas esti kolektita, konservita kaj sistemigita en unu valora tutaĵo. Ĉi tiu tuta laboro ne devas esti prokrastata, ĉar baldaŭ ili, kiuj estis la unuaj batalantoj en la Esperanto-movado, ne plu povos rakonti al la pli junaj tion, kion ili faris, verkis kaj publikigis.

Vi, unuaj batalantoj, ne devas lasi en nekonateco vian agadon. Vi devas helpi nun al la pli junaj ekscii la fariton de vi.

\*) En la bulgarlingva gazeto „Esperanto“, 1926.



Ĝi servos precipe kiel bona ekzemplo. Helpu nun la kunmetiĝon de ĝusta kaj kompleta bibliografio de ĉiuj ĝisnunaj eldonaĵoj pri kaj en Esperanto, aperintaj en Bulgario, ekde la unua momento de la Esperanto-movado. Tiucele oni devos pri ĉiu broŝuro, flugfolio, libro, lernilo kaj gazeto doni la jenajn informojn.

- 1) Aŭtoro.
- 2) Preciza kaj plena titolo (sen ajna ŝanĝo).
- 3) Nombro de la paĝoj.
- 4) Formato.
- 5) Kiu aldono estas.
- 6) Eldoninto kaj eldonloko.
- 7) Jaro de l'eldono.

Krome pri la gazetoj oni indiku:

- 1) Kiom longe ĝi estas aperinta.
- 2) Kie ĝi aperis.
- 3) Kiom da numeroj kaj kiam ili aperis.
- 4) Redaktoro kaj eldonanto.
- 5) Enhavo de ĉiu numero.

Dezirinde estas krom tio ke oni sciigu en kiom da ekzempleroj estas la presaĵoj aperintaj kaj ties koncizan enhavon, tiel pri la libroj, kiel ankaŭ rilate la gazetojn. Grandan intereson prezentas la kvanto de la abonantoj de l'gazetoj.

Al vi, unuaj pioniroj, estas direktata la peto. Vi faris multajn oferojn por la movado, fordonis al ĝi multan tempon; dediĉu al ĝi nun ankoraŭ kelke da horoj, traserĉu viajn bibliotekojn, apartigu tion, kio estas eldonita en Bulgario, eltiru la bezonatajn informojn kaj sendu ilin al BES (str. Car Boris 69, Sofia), indikante ke ili estas por la biblioteko. Kun la daŭro de la tempo la materialoj estas sistemigotaj kaj presotaj. Helpu por restarigi tion, kion nun minacas eterna forgeso! Ni esperos, ke vi ne rifuzos sekvi nian peton.

Mihail Aĝarov,

Aranĝanto de la Biblioteko de BES

---

### Samideanoj!

Se vi deziras konatigi vian landon al viaj korespondantoj en eksterlando, abonigu ilin je „BULGARA ESPERANTISTO“.

Memoru, ke „BULGARA ESPERANTISTO“ ankoraŭ restas la plej malkara Esperanto-revuo, ĝi estas akirebla por ĉiu!

Ne atendu, ke oni vin kelkafoje avertu pri pago de la abono. „BULGARA ESPERANTISTO“ havas neniam aliajn enspezojn, krom la abonpagojn.

---

Redakcia komitato:

Asen Grigorov — Zahari Zahariev



## Bibliografio

Amerika Esperantisto, Aprilo. Sciigas, ke la mortinta samideano Stockton testamentis por E.-organizaĵoj 2500 dolarojn (ĉirkaŭ 350,000 lev.). La sama gazeto serĉas konstantajn korespondantojn (kunlaborantojn) en la diversaj landoj.

Le Monde Espérantiste, Jan. - Febr.

La Progreso, Jan., Febr., Marto, Apr. La Ĉeĥoslovaka Ministerio de Instruado donis al la E.-societo subvencion da 1000 ĉeĥokr. La Ministerio de Poŝtoj oficiale enkondukis Esperanton kiel klaran lingvon en la enlanda telegrafado, de post la 15. Aprilo 1926.

Marto, Marto, Aprilo. Organo de la germanlingvaj samideanoj en Ĉeĥoslovakio.

Pola Esperantisto, Aprilo.

Novaj Tempoj, Jan., Febr., Marto, Apr. Tiu gazeto boniĝas ĉiam pli kaj pli. De nun kiel duonmonata aldonajo de ĝi estos sendata al la instruistoj — abonantoj la esperanta resumo de la Hispana instruista revuo „El Magisterio Espanol“.

Belga Esperantisto, Aprilo.

Literatura Mondo, Apr., enhavas: F. Karinthy: Barabas; I. Sirjaev: En nia distrikto; D. Poljanov: La festo de l'margutoj; J. Soltykeviĉ: Lasta instanco; K. de Kalocsay: El la ciklo „Aglo kaj Kolombo“; S. Zausmer: Vivo sur tomboj; J. Baghy: Kantantaj postenoj, kun muziko de M. Sárossy; J. Baghy: Kiel instruis Mihok la anglan lingvon?; R. Lucio: Tri poemoj; A. Engström: Pentekoste; R. Roht: Nokta ĉielarko; R. Bendre: La virino; L. Urrutia: Antaŭ la virgulino; Observo k. a.

La unuigita tuthomaro, Jan., Febr., Marto, Aprilo.

Internacia radio revuo, Jaro 1 № 1, 2. Oficiala organo de la Internacia Radio Asocio. Leginda estas la artikolo de René Mesny — Propagiĝo de ondoj.

Portugal-Esperanto, Jaro 1, № 1 kaj 2.

The british esperantist, Febr.

Svenska Esperanto Tidningen, Jan. Febr.

International Language, Jan., Febr., Marto.

Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio, Marto, Apr.

Holanda esperanto pioniro, Jan., Febr., Marto.

Svenska arbetar-esperantisten, Febr., Marto.

Internacia stenografisto, Aprilo.

Germana esperantisto, Marto, Aprilo.

Munkáskultura, Marto. Hungarlingva.

La suno hispana, Jan., Febr., Marto.

Esperanto (Rumanujo), Jan., Febr.

Arbeider Esperantisten, Jan, Febr.-Marto.

Espero katolika, Febr., Marto, Aprilo.

Der Arbeiter-Esperantist, Febr.

Itala esperanta revuo, Jan., Febr., Marto, Apr., Majo.



